El la estraro de Germana Esperanto-Asocio

Telefonkonferenco

La antaŭvidita komuna estrarkunsido kun Germana Esperanto-Junularo dum la Internacia Seminario ne okazis, sed la ISon ja partoprenis tri estraranoj, kiuj estis je dispono. Anstataŭe la estraro elprovis telefonkonferencon je la 30a de novembro 2008, laŭ instigo kaj preparo de Rainer Kurz. Tiel oni ŝparas tempon kaj monon, sed montriĝis, ke la neevitebla hasto ne permesas trankvilan diskutadon. Por rapida interŝanĝo de informoj ĝi tamen taŭgas.

Problemoj kun la impost-oficejo

Por la jaroj 2005-2007 la unuan fojon necesis, fari la impostdeklaron al la koncerna impost-oficejo en Berlin. Antaŭe en Freiburg neniam estis problemoj. Malgraŭ detala preparo de la dokumentoj venis postuloj de plipreciziogoj, kaj fine de 2008 telefon-alvoko, ke ankaŭ la novaj informoj ne kontentigis la ŝajne tre rigoran kaj obstinan oficistinon. Do, la prezidanto devos helpe de la kunestraranoj provi tion je la tria fojo. La komun-utileco tamen ne estas en danĝero.

iDiS komencis funkcii

Ne ĝustatempe, sed almenaŭ antaŭ la fino de 2008, ĉiuj membrodatumoj transiris el la malnova administrado en la novan sistemon iDiS. Momente nur kelkaj estraranoj uzas iDiS-on kaj luktas kun la kutimaj komencaj programteknikaj problemoj. Ankoraŭ la stato ne permesas, ke aktivuloj de landaj ligoj kaj lokaj grupoj uzu ĝin. Plej bedaŭrinde estas, ke mankas ĝis nun la indikoj de pagoj kaj de ĝirpermesiloj, tiel ke la jarfinaj laboroj estas precipe komplikaj. Parte la taskoj devas esti farataj en la malnova sistemo. La estraro esperas, ke iDiS rapide progresos kaj ne okazos prokrastoj, produkti la eksped-etikedojn por *Esperanto aktuell* kaj la kvitancojn por la donacoj el la jaro 2008.

Rudolf Fischer

Berlino – Ĉu nova administra centro de Esperanto?

Domo en Berlino evoluas al nova administra centro de Esperanto en Germanio. En venonta numero de *Esperanto aktuell* legeblos intervjuo kun la organizantoj. Ili parolos pri la ĝisnunaj laboroj kaj siaj planoj. *red.*

Esperanto-Stand auf der Expolingua

Vom 14.-16. November 2008 fand in Berlin die internationale Messe für Sprachen und Kulturen statt. Mit dabei war Esperanto. Die Expolingua wird hauptsächlich von Schülern, Eltern, Auszubildenden, Studierenden, Lehrern, Dozenten, Professoren und Übersetzern besucht. Alle Besucher haben in der Regel ein großes Interesse an Fremdsprachen und Kulturen und damit auch an Esperanto. Geholfen haben etliche Mitarbeiter der Deutschen Esperanto-Jugend und des Deutschen Esperanto-Bundes. Allen Mitarbeitern an dieser Stelle einen großen Dank. Ein Dank auch allen, die sich finanziell an der Teilnahme beteiligt haben. Es wurden etliche interessante Gespräche geführt. Verwendet wurde auch das neue Informationsmaterial des DEB und eine neue Werbepostkarte für die Massenverteilung. Besonders gut fanden die Interessenten, dass auf der Werbepostkarte alle wichtigen Netzadressen zu finden waren. „Esperanto-Informationsarbeit auf Messen ist wichtig“, so der Generalsekretär des Deutschen Esperanto-Bundes Martin Schäffer. „Es geht nichts über das direkte Gespräch mit den Interessenten. Die Expolingua trifft zudem unsere Zielgruppe sehr gut“. Auch konnten die Helfer Kontakte zu etlichen Sprachverlagen und Organisationen knüpfen. Am Sonntag Nachmittag konnten die Expolingua-Besucher einen kleinen Esperanto-Sprachkurs besuchen (45 Minuten). Im Januar fand ein Esperanto-Schnupperkurs für die Expolingua-Interessenten unter Leitung von Felix Zesch in Berlin statt. Insgesamt also ein sehr guter Erfolg! *Martin Schäffer*

Gazetoj: ***Esperanto aktuell*** je la kvina rango

En 2008 la plej grandaj gazetoj denove estis *La Ondo de Esperanto*, *Esperanto*, *Sennaciulo*, *Monato* kaj *Esperanto aktuell*. *La Ondo de Esperanto* en 2008 superis *Monaton*, la plej grandan gazeton de 2007.

titolo	**paĝoj**	**formato**	**m²**
La Ondo de Esp.	308	205x290	18,3
Monato	308	199x268	15,9
Sennaciulo	236	210x296	14,6
Esperanto	264	188x266	13,2
Esperanto aktuell	168	210x297	10,5

La redakcio de *Esperanto aktuell* dankas al ĉiuj, kiuj sendis interŝanĝekzemplerojn. Ni sendas tiujn gazetojn al la Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen. *red.*